

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE
ESPERANTOFÖRENING

Officiellt organ för Svenska Esperanto-Förbundet (S. E. F.) och Norvega Esperantista Ligo (N. E. L.)

Redaktör — redaktoro: **R. PEHRSSON**, 3—23,
Gävle, (Svedujo).

Ansvarig utgivare — responde eldonanto kaj
administranto: **W. WAHLUND**, Gävle, (Svedujo).

N:o 7.
Juli 1915.

Prenumerationspris — abonprezo: i Sverige
1:20 kr., i Norge 1:60 kr., eksterlande 1: — Sm.
(1:82 kr.).

Lösnummer 10 öre.

Annonspis — anonprezo: 5 öre pr mm.

Esperanto och kriget.

(Från Byrån för upprätthållande av nationellt samarbete i Köpenhamn.)

Bland internationella rörelser intar esperantorörelsen en särskild ställning under det nuvarande kriget. Esperantisterna ha icke blott hållit sitt ideals fana högt under denna förskräckliga tid, utan ha också räckt varandra handen mitt i krigets söndrande inflytande på det internationella livet och deras sak har vunnit ett framsteg, som flera års propaganda knappast kunnat åstadkomma. Inte ett ögonblick har bandet mellan esperantister från olika land brutit och intet hat har hysts på någon sida, icke ens mellan engelska och tyska esperantister.

Som ett medel att förstå varandra, och inte tillhörande någon nation, bidrar språket kraftigt till att bryta ned skrankorna, som söndra mänskligheten. Endast esperantisten känner till fullo den känsla, som uppkommer, då han på det gemensamma språkets plan stående ansikte mot ansikte med en utlänning kan med dess hjälp bortse från hans nationalitet och i honom se en människa och broder. Broderskap är icke något som man blott talar om utan något som praktiseras hos esperantisterna.

Att detta ej är något tomt prat, visas av den ömsesidiga hjälp som esperantister givit varandra under kriget. Knappast någonsin ha anhängare av de många ideella rörelserna så raskt och oförtövat lämnat sina meningsfränder verklig hjälp som de. Nämnas kan, vad de fran-

ska esperantisterna gjorde för de främlingar, som kommit till Paris för världskongressen; den hjälp, som kommo de tyska och österrikiska esperantisterna till del, tillföll säkerligen icke många av deras landsmän i den franska huvudstaden.

De neutrala landen har naturligtvis spelat en viktig roll som centraler för efterforskningar. Köpenhamn har burit sin andel av bördan, och vår byrå var kanske den första, som grep sig an med att arbeta systematiskt. Det var i synnerhet Tyskland, Ryssland och Belgien som vände sig till Köpenhamn. Byrån arbetade huvudsakligen med kommittéer och byråer i Kiev, Moskva, Berlin och Dresden. Efterforskningar i Belgien skedde mestadels per telegraf och byrån lyckades finna många polska judar, som studerade i Belgien och Tyskland, ty som bekant kunna de icke vinna tillträde till ryska universitet. Vi kunna tillägga, att konsulter och ministrar voro ur stånd att finna dessa personer.

Det är sant, att vår byrå fann det mycket lättare att arbeta med Tyskland. I Ryssland lade språket stora svårigheter i vägen; man kan helt enkelt icke förstå fångarna och följaktligen försvinna de utan att man vet var de äro eller vad de hefta. En annan sak är det med esperantisterna, som alltid äro angelägna att träffa den eller den personen, och som kan förstå dem, i synnerhet nu när krigsledningen understöder esperantoundervisningen. Det band som förenar oss alla gör oss alla villiga att hjälpa varandra även i fiendeland. Därför är det lättare att söka efter och spåra esperantister.

Paris och Genève kunna också nämnas såsom centra för efterforskningar efter de försvunna; världsesperantoförbundets centralbyrå har gjort ett stort arbete. I november ombesörjde byrån, för att nämna några siffror, 7,664 brev, ankommande och avgående, och i december 14,935.

Utrymmet tillåter oss icke att redogöra för några av de många avseenden, i vilka esperanto varit av oberäkneligt värde för många ute på krigsskådeplatsen. Här må endast givas ett exempel på den sympati esperantister känna för varandra, ett exempel, som står nästan utan jämförelse i krigets historia. En tysk fången esperantist blev under en tid av resan till Sibirien kalfaktor åt en rysk officer, även han esperantist.

Behovet av ett allmänt neutralt språk har drivit fram esperanto i soldaternas led. I fånglägren gives undervisning i språket. Franska esperantister hava ordnat så, att esperantoläroböcker skola sändas från Tyskland till de tyska fångarna och nu begära tyskarna i gengäld franska läroböcker för de franska fångarna. I många läger finnas esperantotolkare, då esperanto är tillåtet som korrespondensspråk för fångarna.

Det talas mycket om möjligheten av att på nytt taga upp internationellt samarbete och att internationella kongresser är en omöjlighet till en början. Det kan ligga en viss sanning i det, i synnerhet vad fackliga kongresser beträffar. Språket, som alltid stått hindrande i vägen, kommer nog att i en ännu högre grad verka som en söndrande faktor. Här ha esperantisterna ett stort för-

språng. I och med ett enande, samlande språk glömmas nationaliteterna.

Mitt under kriget tala vi redan om var nästa esperanto-världskongress skall hållas. Tyska esperantister ha t. o. m. uppmanat fransmännen att förnya inbjudan till Paris och de skola komma. Men den första kongressen kan näppeligen hållas i ett av de krigförande landen; den måste helt naturligt bli i ett neutralt; och vem vet om icke Danmark blir utsett att mottaga denna esperanto-världskongress, den fjonde*) i ordningen, som säkerligen kommer att bli en fredskongress i ordets bästa bemärkelse?



Grammatiska strövtåg.

Av Elias Beckman.

Under min praktik som lärare i esperanto har jag funnit, att åtskilliga kapitel i grammatiken fördras mera ingående och särskilt för svenskar lämpad behandling, varför jag tänkt försöka framdeles utge ett komplement till den gängse läroboken, som är fotad på Zamenhofs läsövningar. För att möjligen av sakkunniga kunna få råd och kritik och samtidigt ge en handräckning åt nybörjare, publicerar jag härmed några brottstycken, och hoppas jag att för saken intresserade vilja bistå mig med råd och ev. kritik, privat eller via tidningens redaktion.

Förf.

Relativa och frågande pronomen.

I. Frågande.

Singularis.

Nom.	1) Kiu?	1) Kiu?
Gen.	2) Kies?	2) Kies?
Dat.	3) Al kiu?	3) Al kiu?
Ack.	4) Kiun?	4) Kiujn?

Singularis.

1) <i>Kiu</i> (persono)	1) <i>Vilken</i> (person)
faris tion?	har gjort det?
<i>Mi</i> faris tion.	<i>Jag</i> har gjort det.

*) Sedan ovanstående skrevs, har det bestämts, att hålla en världskongress i San Francisco i år, som fått numret XI; nästa års kongress, som då eventuellt skulle bli Köpenhamn, blir således den XII:e.

Via frato ankaŭ faris tion.

2) *Kies* libron vi havas?

Mi havas *mian* libron.

Mi havas la libron *de via frato*.

3) *Al kiu* li pruntis la ombrelon? *Al mi* li pruntis la ombrelon.

Al via frato li pruntis la ombrelon.

4) *Kiun* vidiston li prenos?

Min li prenos.

Vian fraton li prenos.

Pluralis.

1) *Kiuj* estas liaj veraj amikoj?

Ni estas liaj veraj amikoj?

Viaj fratoj estas liaj veraj amikoj.

2) *Kies* vico estas nun?

Nia vico estas nun.

La vico de viaj fratoj estas nun.

3) *Al kiuj* lidonis monon?

Al ni li donis monon.

Al viaj fratoj li donis monon.

4) *Kiujn* li estis batinta?

Nin li estis batinta.

Viajn fratojn li estis batinta.

Genom ovanstående exempel synes sammanhanget mellan frågande pronomens böjningsformer och motsvarande böjningsformer av substantiv och personliga pronomen.

Anm. Observera olikhet mot svenskan i fråga om ordföljd i exemplen under 3!

Vi övergå nu till relativa pronomen med särskilt aktgivande på översättningen av det svenska *som*.

Singularis.

1) *La pastro, kiu*

Din bror har också gjort det.

2) *Vems* bok har du?

Jag har min bok.

Jag har din brors bok.

3) *Vem* lånade han paraplyn till? *Mig* lånade han paraplyn till.

Din bror lånade han paraplyn till.

4) *Vilken* väg visare skall han taga?

Mig skall han taga.

Din brors skall han taga.

Mi (*vi*, *li*, *ŝi*) venas tie ĉi.

2) *La pastro, kies* frato estas mortinta.

3) *La pastro, al kiu* mi pruntis monon.

La pastro pruntis monon *al mi* (*vi*, *li*, *ŝi*).

4) *La pastro, kiun* vi vidis,

La pastro vidis *min* (*vin*, *lin*, *ŝin*).

Jag (*du*, *han*, *hon*) kommer här.

2) *Pastorn, vilkens* bror är död.

3) *Pastorn, som* jag lånade pengar till.

Pastorn lånade *mig* (*dig*, *honom*, *henne*) pengar.

4) *Pastorn, som* du såg,

Pastorn såg *mig* (*dig*, *honom*, *henne*).

Pluralis.

1) *Laknaboj, kiuj* estas en la lernejo.

2) *Laknaboj, kies* gepatroj pagas por ili.

3) *La knaboj, al kiuj* mi diris tion.

4) *La knaboj, kiujn* vi vidis.

Mi vidis *vin* (*lin*, *la knabojn*).

1) *Gossarna, som* äro i skolan.

2) *Gossarna, vilkas* föräldrar betala för dem.

3) *Gossarna, som* jag såde detta till.

4) *Gossarna, som* du såg.

Jag såg *Er*, (*dem*, *gossarna*).

forts.



Afrika.

I *Johannesburg* (Sydafrika) har börjats en esperantokurs, vari bl. a. 11 boyseouter delta.

Amerika.

De vid universitet i *Utah* hållna sommarkurserna upplaga undervisning i esperanto på sitt program. Allmänhetens intresse för språket är tack vare arbetena på världsesperantokongressen i San Francisco i ständigt stigande. Kurser pågå mängenstades.

Asien.

En livlig esperantoverksamhet bedrivs i Japan; en ny förening har bildats i *Kotogakko*, av kurser pågå fyra i *Jokohama* och en i Tokio, den senare för kineser. — Redaktören för den kinesisk-esperantistiska tidningen »*La Voco de la Popolo*», *Sifo*, har avlidit. Den kinesiska esperantorörelsen förlorar i honom en av sina ivrigaste förkämpar.

England.

Ett nytt uppslag i fråga om studiet av esperanto har givits av esperantoföreningen i *Edinburgh*, i det den under inst. augusti kommer att anordna en »studievecka» för esperantister från alla delar av landet, som önska utvidga sina kunskaper i esperanto. I programmet för kursen ingå föredrag om och på esperanto samt anordnandet av talrika utflykter med utmärkta tillfällen att tala språket. — En kurs i esperanto har under vintern hållits för belgiska flyktingar i *Hastings*, en i *Southport* för de där förlagda soldaterna, av vilka många också kunna tala esperanto, när de bege sig ut till fronten. I *Burnley* ha samtidigt pågått ej mindre än 10 kurser med cirka 200 deltagare, av vilka de flesta anmält sig efter krigets början. — Som ett resultat av den nyligen hållna kongressen i *Bath*, har börjats en kurs i tekniska skolan därstädes.

Holland.

De holländska esperantisterna avhöll den 11 juli sitt förbundsmöte i Amsterdam. — En ny esperantoförening har bildats i *Rotterdam*, med medlemmar huvudsakligen från handelsskolorna, läroverken o. s. v. — I *Harderwijk*, där redan förut flera kurser i esperanto pågå bland de internerade, har ännu en med ett 50-tal deltagare börjats den 1 juli, och i *Utrecht* deltaga ett 30-tal scouter i en avgiftsfri kurs i språket.

Tyskland.

Trots de skärpta bestämmelserna om postbefordran tillåtes esperanto fortfarande som korrespondensspråk.

— Esperantorörelsen bland krigsfångarna börjar taga fart: i fånglägret *Quedlingen* studera ett 30-tal franska fångar esperanto och i *Ohrdruf* 25. De ordinarie kurserna pågå som vanligt, bl. a. har liksom föregående år anordnats en kurs för badgästerna vid *Östersjöbadorten Henkenhagen*.

Åttonde brittiska esperantokongressen.

Ett nytt talande bevis för huru relativt oberörd av kriget esperantorörelsen är, har man i den i slutet av maj i *Bath* avhållna brittiska esperantokongressen, som trots att den hölls i ett av de stridande länderna, blev en stor succés med ett deltagareantal av cirka 200 esperantister. Häre äro då inräknade de till ett 15-tal uppgående belgiska esperantisterna, som, av kriget fördrivna ur sitt eget land, härute i landsflykten samlade sig till en belgisk esperantokongress på brittisk jord, och vilka gävo åt den brittiska kongressen en särskild prägel.

För kongressen hade stadens rådhus upplåtits av myndigheterna, och förhandlingarna öppnades av stadens borgmästare i egen person. Bland kongressens beskyddare märktes hertigen av *Connaught* m. fl. framstående personligheter.

Söndagen den 23 maj hölls en anslående gudstjänst på esperanto, förordad av Rev. J. Cyprian Rust, väl känd för det arbete han nedlagt på esperantoöversättningen av *Nya Testamentet*. Dagen för övrigt var anslagen till utflykter i stadens omgivning. På kvällen hölls ett stort »propaganda meeting».

På måndagen höll det Brittiska esperantoförbundet sitt årsmöte. Förhandlingarna visade att det ej fanns någon benägenhet för att låta kriget hindra arbetet för esperanto, utan syntes allmänna meningen vara, att man nu mer än någonsin skulle sätta in sina krafter på det. Ett glänsande uttryck för denna stämning gavs, när de närvarande på en uppmaning att stödja förbundets garantifond på några minuter tecknade belopp i densamma uppgående till en summa av mer än 1,000 pund st. (18,200 kr.)

Till förbundets ordförande återvaldes Mr. H. Bolingbroke Mudie.

Kongressen avslutades medelst en högtidlig festlighet.



Samideanoj!

Abonu "La Espero"!

En krigsfånges erfarenheter om esperanto.

»Om jag nu vore i Europa, skulle jag föredraga ett medlemskort i något esperantoförbund framför ett amerikanskt pass och fickan full med kreditbrev», citerade vi nyligen efter »Amerika Esperantisto. Och många äro de som sedan krigets början fått lära känna värdet av ett internationellt, neutralt, språk. T. o. m. i det avlägsna Sibirien, dit ryssarna sända en del av sina fångar, har det sina fördelar att vara esperantist. En österrikisk esperantist, som fallit i rysk fångenskap, har i »Prager Tagblatt» skildrat sina erfarenheter härutinnan:

»Först när jag föll i ryssarnas händer, insåg jag värdet av ett neutralt språk. Den lilla gröna stjärnan, som jag alltid bär på mig, väckte ryssarnas nyfikenhet. Man uppmärksammade en officer på den. Dennes ansikte lyste upp, när han fick se den, och han tilltalade mig genast på esperanto.

Han frågade mig om nyheter och ville veta, om det var sant, att hela österrikiska armén var slagen i Galizien, som det hade meddelats i de ryska tidningarna, och att fransmännen hade nått fram till *Rehu*. När jag talade om för honom, att det ej fanns någon sanning däri, blev han mycket överraskad.

Tack vare denna officer, fick jag en utmärkt behandling och sändes efter ett par dagar till Moskva. När jag kom dit, så hade budskapet om att jag läst esperanto, gått före mig, och snart kommo tre officerare till mig och voro förtjusta över att på detta världsspråk kunna samtala med en utlänning. Av dessa officerare erfor jag, att krigsministern var avgjort gynnsamt stämd för detta språk och att många av officerarna hade studerat det.

Senare sändes jag till Sibirien. Det var en nästan ändlös färd genom köld och snö.

Vid min ankomst hit fann jag en hel liten esperantoförening — några ryssar, några ungrare och flera italienare och vi äro alla i tillfälle att samtala, vilket annars ej vore möjligt. Ehuru denna del av Sibirien har sina olägenheter och obehag, så göra vi oss det rätt trevligt och leva i hoppet att snart kunna återvända till vårt fädernesland.»

La nova pacagado.

Resumo de artikolserio de R. Moc, la sekretario de la Norvega Nobel-packomitato, Kristiania.

De Brynjulf Jhss. Klingenberg

II.

(Forts.)

Jen la malkvietigaj flankoj de la pacpolitikaj postuloj de la neŭtralaĵ landoj, ĉar tiuj devus sin reprezenti dum la nomita kongreso nur per la koncernaj ŝtatestroj. Bedaŭrinde niaj parlamentanoj ne ŝajnas kompreni tiujn malkvietigajojn. Jen la pruvo: La interpelacio*) de Stockholm urbestro s-ro Lindhagen atingis la 24-an de februaro 1915 grandiozan forrifuzon kaj radikan morton.

Post tri semajnoj socialista norvega parlamentano en la norvega parlamento kuraĝas prezenti la saman demandon, kaj atingas aranĝi debaton pri tiu sen tio, ke la vera kunrilato estis komunikata. Oni supozis tie ĉi, ke temas pri afero serioze priatentita de la sveda registaro. Advokato, sinjoro Michelet, interalie bedaŭris sian senpreparon pri la afero, kiun li trovis »bone inda al pripenso». Neniu el la parlamentanoj — tute strange — reagis kontraŭ la propono. Oni vere sincere preparolis la eblecon de komuna ago de la tri nordaj parlamentoj.

La publiko certe ne estas komprenanta, ke la elirpunkto por la ĝisnuna kunlaboro de la tri nordaj registaroj ne estis kaj ne povas esti konscia emo por manifesti certajn tutskandinavaĵajn interesojn, sed nur tio, ke la tri registaroj trovas, ke certaj deziroj kaj postulaj pri la libera komerco kaj ŝipveturado sin trovas esti egalspecaj en la tri landoj kaj tiamaniere povas doni eblecon por egalspece aŭ egaligite diplomata agado.

Tiu ĉi sola kaj ebla fundamento por politika »skandinavismo» estu tute ŝanĝata per provo fari agon kontraŭ la militantaj ŝtatoj, — ne en siaj propraj, egalaj, komercaj aŭ similaj interesoj, sed en la interesoj de la kunigita Eŭropo, por, kiel

memoficigitaj reprezentantoj de la justeca moralo, rekomendi al la eventualaj venkintoj certajn etikjurajn principojn por la formigo de la fina paco.

Mi supozas, ke estas la konscio de l' malebleco logi la tri nordajn registarojn al la rajdo de la ne maldanĝera popolrajta »Aasgaadsvei»,*) kiu kaŭzas al la Reĝa Frederika Universitato en Kristiania ekpreni specialan mondiniciativon.

La eminenta rektoro de la nomita universitato ŝajnas esti en malsukcesa momento aŭdinta kelkajn aerajn komercpolitikajn fantaziaĵojn de afektega algebroekonomiisto.

La rektoro estas anoncinta agon inter la tutmondaĵ scienculoj por apogi la proksime kuŝantan laboron por vekti fortan opinion pri la iam starigota paco, por ke ĝi estu konstruota laŭ principoj, kiuj laŭeble certigas ĝian daŭron. Kiel instruisto de ŝtatsciencoj li antaŭmetas postulon pri »ekonomia organizado, — speciale pri la politiko de la malfemita pordo».

Oni havas pli ol sufiĉe maldolĉan sperton en nia praktika unuiga politiko sur la skandinava duoninsulo pri la miraklofarantaj agoj de ŝtatsciencan profesoroj enkalkulite s-ro Morgenstjerne**).

La antaŭmetita postulo pri la politiko de la malfemita pordo montras la universitatan pacagadon akorda kun la programo de Anti-Oorlag-Raad. Miaj artikoloj sin ne turnas kontraŭ la nuntaga pacdeziro.

Mi deziras nur montri al tiu fakto, ke oni je la nuna tempunkto tute forgesas la fatalan krizon, en kiu la gravaj, efektive agantaj organizaĵoj sin trovas. Anstataŭ ĝustatempe pensi pri la restarigo de tiuj ĉi, oni ekkaptas tute novan kaj politike diletantan ideoprogramon.

La unua punkto de tiu programo ankaŭ en Norvegujo estas la postulo pri »parlamentara kontrolo de la eksterlanda aferestraro», t. e. de la supozate neresponebla diplomatio. La norvega fundamenta leĝo, post la ŝanĝoj kaj decidoj faritaj la 3-an de marto 1911, havas jam firmajn regulojn pri tia parlamentara kontrolo. Sed tio estas tute sensignifa por la nuna okazo, ĉar oni povas diri al si mem, ke la pacagado kiel

internacie ordigita movado estas absolute malhelpita enpreni en sian programon laboradon kiu intencas plibonigon de la konstitucioj aŭ de la parlamentaj kutimoj de la landoj unuope.

Ĉi tion evidente ne komprenas ĝeneralsekretario s-ro Chr. L. Lange, ĉar li prezentas tiucelajn reformprojektojn en siaj paroladoj kaj broŝuroj.

Mi pensas, ke Angloj, Francoj kaj Germanoj certe protestus tute forte, se packonferenco ekprenus dikti novajn paragrafojn al iliaj fundamentleĝoj.

Kiam la novaj packomitatoj starigas postulojn intencantajn, ke la pacigo estu antaŭmetata al la respektivaj parlamentoj por fina decido, ŝajnas al mi, ke tio devas esti refutata kiel maldelikataĵo.

La internacia pacmovado laŭkaraktere povas nur labori por ideoj realigeblaj en formo de konvencio aprobata interpopole.

Ĉiaj aliaj demandoj, eĉ se ili estus senpere valorantaj por la pacagado, devas memdirite esti lasataj al la politikaj partioj en la unuopaj landoj. Cetere kiel mi antaŭe diris, estas treege malsaĝe, kaj pereigante por la afero, enpreni en la agoprogramon reformon, kiu ĝis nun nur estas proponita de treege radikalaj grupoj.

Kiel jam dirite tia punkto timigos la burĝajn partiojn, sed tute ne povas kunligi la diversajn burĝajn anojn de la pacmovado. —



Repagoj por la Deko.

El »The British» ni represas sube respondon de la komitato je demando pri repagoj por la Deko kongreso en Parizo:

»Estimata samideano,

Volonte mi respondas al via letero de la 12-a nuna, per kiu vi demandas, ĉu la komitato intencas repagi la sumojn pagitajn por la ekskursoj k. t. p. Ĉar mi jam ofte devis respondi al simila demando, mi estas komisiita de la Komitato por respondi ke: ĉiu pago, krom por la kongreskarto, estos post la milito repagata malpli depreno de 15 % por la jam okazigitaj kaj pagitaj elspezoj al la agentejoj k. t. p. Vi do povas diri tion al ĉiuj kiuj troviĝas en simila cirkonstancoj.

*) 24/2, 1915: Ĉu la registaro, eventuale la tri nordaj registaroj, intencas prepari celkonscian agon de sveda, eventuale skandinava, flanko por kombine kun la fina interklaro de la mondkrizo kutimigi pravan ordigon de la justeco en la mondsocio, kaj tiaokaze, ĉu oni povas atendi kunlaboradon kun la popola reprezentantaro?

*) La rajdo de la militaj diinoj akompanantaj kaj helpantaj la falintajn militistojn, alveni al la Korto de l' diestraro (norda mitologio).

Elp. aa kiel o, ei kiel ej [Red.].

**) Vidu B. J. Klingenberg: Intermita Sciigo 1914—1915, — 1—8.

La Heredaĵo de Gustav Vasa.

(El Novaj svedaj sortoj de August Strindberg.)

Svedujo denove kuniĝis en unuigo, tiun ĉi fojon kun la reĝa respubliko Polujo, kies trono nun apartenas al la nepo de Gustav Vasa. Ĉar Danujo malhelpis al Svedujo vastiĝi suden, la lando sin etendis unue norden, por poste okupi la landojn trans la Botna golfo, ĝis Weichsel kaj estis nun uzorponta la bordojn de Donau.*) Estis kuniĝinta tutaĵo, kiu tre bele aspektis sur la geografia karto.

La reĝo de la unuigo estis edziĝinta kun aŭstria princino de la dinastio Habsburg, kion oni konsideris granda honoro; la interkomunikado estis reguligata per la traktato de Kalmar, kiu certigis al Svedujo memestrado. Ĉio estis tre bone ordigita, laŭŝajne, kaj tamen la malhelpaĵoj amasiĝis tuj en la komenco. Duko Karl, ne amante vidi sian nevon en tia altranga situacio ofendiĝis kaj sentis sin kvazaŭ flankenpuŝita; li ja naskiĝis por regi kaj estis tre ordonema, pro kio li potencigis sin, igis la parlamenton elekti lin regnestro, enskribis en la decidaron de la parlamento kion ajn al li plaĉis, kaj per tia agado li akiris al ĉiuj faritaj de li perfortaĵoj leĝecigon. Ĉe la kunveno de Upsala li tamen faris malsukceson, kiam li tute kontraŭleĝe volis malpermesi la katolikismon; estante mem Kalvinano li devis subskribi la dokumenton, kiu ekzilis la Kalvinanojn kaj Zvinglianojn. Svedujo per tio fariĝis limigite kaj pozitive Lutherana, estinte ĝis tiam generale protestanta. Al tiu kunvendo, kiun li mem devis subskribi, kaj kiu juĝis lian propran kredon, ankaŭ Sigismund devis submetiĝi por ke li estu kronumata. La du sinjoroj agis ja kontraŭkonvinke, kaj estis kondukataj nur de potencaŭzoj kaj de respekto al la utilo submetiĝi al konfesoj, kiujn ambaŭ malaprobis.

Sed troviĝis ankaŭ persona preteksto por la malamo de duko Karl kontraŭ Sigismund kaj kies motivon kaŝi lin devigis la fiereco. La dua edzino de Karl, Kristina de Holstein—Gottorp, filino de tiu Kristina al kiu Erik XIVa foje sin svatis,

unufoje estis proponita al Sigismund, sed ĉar li rifuzis akcepti ŝin kiel fianĉinon, oni facile povas al si prezenti la sentojn de la vengema duko, kiu prenis tion, kion la nevo malakceptis. Ĉiuj arbitraĵoj de Karl dum la foresto de Sigismund pravas ankaŭ malamemecon kaj sisteman serĉadon por trovi batalkaŭzojn; kaj kiam Sigismund forlasis Svedujon, apatie turnante la dorson al ĉio, li estis persekutata de la reĝo Karl IXa per milito interne en la limoj de Polujo.

Sigismund, kies historion skribis Karl IXa kaj lia samopiniano, ŝajnas tute ne esti tia simplulo aŭ fanatikulo kiel konsideras la historio. Li konsentis al la Lutheranoj en Svedujo planan liberecon religian sed rezervis al si kaj sia anaro la saman rajton, kion oni tamen malkonsentis al li. Naskita en karceroj kaj edukita en la religio de lia patrino li spertis ĉiujn mizeraĵojn de la tempo de la dinastio Vasa. Li vidis sian onklon Erik freneziĝinto kaj mortiganto; laŭ tio kion li aŭdis lia propra patro estas konata kiel fratmortiganto, la onklo Magnus estas kuracata kiel frenezulo kaj memmortiganto, la onkloj montras sin morale malsaĝiĝintaj; la ĉeffaro de la avo, la unueco de la regno estis minacata per perejo pro la malpacoj kaj konfesobataloj internaj de la dukoj. Ĉio, kion oni en antaŭa tempo konsideris difinita, denove estis diskutata; decidoj estis nuligataj, la leĝo pri heredo de reĝeco estis dubata; en la novkonstruado de la regno dum la tempo de Vasa ŝajnis revivi la mirrakonto de la Folkunga dinastio; la »festeno de Nyköping«^{*)} ree estis farata ĉe Grips-holm, kaj la »Håtuna-ludo«^{**)} denove estis ludata en Örbyhus.

En tia epoko de ŝanceliĝo kaj maltrankvilo Sigismund estis elkreskanta, subtila, nobla naturo, kiun turmentis ĉiu apero de krueleco kaj kiu plivole suferis malbonon ol faris ĝin. La tedon pri la sovaĝinta patrujo sekvis prefero al la lando de lia patrino; kaj kiam li du fojojn estis vizitinta kiel reĝo

*) Tiel estas nomita unu el la plej malhelaj okazintaĵoj de la sveda historio; post amikeca festeno la tiama reĝo Birger lasis perfide kapti siajn fratojn kaj internigis ilin en terura kastela karceroj, kie ili baldaŭ mortis pro malzorgo.

**) La »Håtuna-ludo« estis perfidaĵo simila al la »festeno de Nyköping« kies ĉefa kaŭzo ĝi estis. Tie reĝo Birger estis perfide kaptata de siaj fratoj kaj malliberigata. Poste liberiginte, la reĝo prenis la teruran vengon en Nyköping.

Svedujon kaj trovis la disiĝon kaj la konfuzon almenaŭ tiel granda kiel en Polujo, li decidis resti en tiu lasta kie li jam per edzino kaj infanoj estis enradikita. La lasta vojaĝo entreprenita en la jaro 1598a kun ĝiaj aventuroj kaj danĝeroj montras forte la karakteron de la du kontraŭuloj kaj ĝi faras cetere turnpunkton en la historio de Svedujo, turnpunkto, ĉe kiu oni restas tiel por la unua el ili kiel por la alia kun kompto.

* * *

Princino Anna, fratino de Sigismund, loĝis en Stegeborg, kiu tiam estas grandioza kastelo, pligrandigita de Gustav Vasa per brikoj el la monaĥejo de Söderköping kaj pli-beligita de Johan IIIa. Kiel gastoj ĉe ŝi loĝis Johan Gyllenstjerna kaj Siri Brahe, kies faman merkredan edziĝofeston ŝi fondis; kaj krom tiuj ŝia amiko Gustav Brahe, kun kiu ŝi laŭ diro estis fianĉiginta.

Anna estis rapidema kaj decidema knabino, kiu kore amis sian fraton Sigismund, spite lia katolika kredo, kiun ŝi unu fojon pro ĉiuj depetis de si; ŝi estis akompaninta lin al Polujo, partoprenis la kunvenon en Reval kaj atendis nun la alvenon de Sigismund al Stegeborg, ĉar ŝi sciis, ke ĵus estis forlasinta Kalmar la ŝiparo kun kiu Sigismund venis. La fremdaj ŝipoj estis videblaj en la arkipelago de Östergötland, sed neatendite iris norden preter la golfo Slätbaken, pro kio oni timis kolizion kun duko Karl, kiu estis ĉe la arbaro Kolmården kun kvin mil soldatoj.

Tiam venis neatendite rajdanta sendito kun la sciigo ke la reĝa ŝipo Blanka Aglo aperis sur la golfo. La princino surŝipiĝis sur galero kaj renkontis sian fraton sur la lago, kie li venis en pompa akompano de eksterlandaj dukoj kaj grafoj. La gefratoj estis albordigitaj dum la ŝipo ankris por atendi la ceteran ŝiparon, kiu estis disiĝinta de blovego en la markolo de Kalmar.

Kaj ili ree sidis kune en la malnova Vasa kastelo atendante sian sorton

— Do hejme denove, sed pli fremda ol iam antaŭe, diris la reĝo, inspektante la duonmalplanan malfermitan ĉambron.

— For estas plej bone, respondis la fratino; eĉ mi sentas la forreston de la polaj tiliarbaroj kun ĝiaj najtingaloj... Sed nun vi devas prirakonti vian vojaĝon.

*) Ankaŭ: *Danubo*.

La reĝo ĉirkaŭturniĝis por eble trovi aŭskultantojn, lasis la rigardon eliri tra la fenestro kaj vidis kiel oni rikoltas ĉerizarbojn. Poste li komencis paroli kun sia moderigata voĉo sen altigoj aŭ malaltigoj:

— Vi ja scias kiel la dukino sin kondukis dum mia foresto; kiel li kunvokas parlamenton kaj faras parlamentajn decidojn; nun post mia lasta estado ĉi tie li ĉirkaŭvojaĝis ĉe foiroj kaj ribeligis la popolon, la vilaĝanojn antaŭ ĉio; kondutas kiel ribeliganto, kaj kiam mi vokita hejmen intencas vojaĝi, li rifuzas al mi la ŝipojn. Per fremdaj ŝipoj mi venas al Kalmar; la urbaj pordegoj estas ŝlositaj al mi, la reĝo de la lando, kaj mi devas sieĝi mian propran urbon. Kiam mi krom tio sciigis, ke la dukino kolektis kvin mil soldatojn, mi kunprenis egalan nombron da miaj polaj soldatoj, kaj ĉar la regnoj estas kuniĝintaj unuiĝe, mi ne povis nomi la polojn fremdaj trupoj. Li volas ke mi aperu senarmila kontraŭ lia armilhava bando kaj sendas la dukino al mi senditon por demando, ĉu mi venas kiel amiko aŭ malamiko, ĉar mi kunprenas fremdajn trupojn. Lia naiveco estas tiel miksa kun malicio, ke li ne mem rimarkas, kiel li malkaŝas siajn ruzaĵajn intencojn. En kiu ajn alia lando li estus jam kondamnita ribelo kaj perdus la vivon, honoron kaj havaĵojn en la unua instanco. Sed —

La reĝo ĉesigis sian parolon.

— Ĉu oni ne povas haltigi la laboron en la ĝardeno? Ĝi ĝenas min kaj mi ricevas la impreson ke oni aŭskultas.

Tuj ektondris pafado, kaj kvazaŭ pafita korniko falis el la plej proksima ĉerizarbo viro, rompante per sia falo branĉojn.

La ĉasanto alvenis el la framda arbetaro apude, esploris la pafitaĵon, kaj ĵetante mankison al la princino en la fenestro, kiun li opiniis esti sola, li ekkriis:

— *All's tadt!* Unu el la skribistoj de la reĝo kiel spiono.

La princino starigis ruĝiĝante pro la mankiso, sed la reĝo, kiu vidis tion, kion li ne devus aŭ volis vidi, aperis kaj alparolis la pafinton:

— Gustav Brahe; ĉu estas milittempo ĉar vi pafas samlandanojn?

— Jes, via moŝto, estas milito, sed ni devas...

— Ni devas atendi mian ŝiparon, kaj vi komencis tro rapide. Venu nun ĉitien kaj ordigu, se vi povas, tion ĉi.

La princino intencis klarigi la

neatenditan mankison, sed la pensoj de la reĝo estis malproksime kaj li ne amis iaĵajn ajn tiajn intimajojn.

Gustav Brahe, ĉambelano kaj ambasadoro de la kortego de Sigismund, envenis tra la malfermita ĝardeno pordo kaj alfaris konvenan por tiu ĉi okazo mienon, kiu nenion malkaŝis tamen ne kaŝante ion.

(Daŭr.)



Esperantismo.

Ŝajnas al mi, ke ne ĉiuj tute klare komprenis tiun vorton. Tial mi volas uzi la okazon por diri kelkajn vortojn pri tio. Oni ofte aŭdas personojn kredi, ke esperantismo estas esprimo por la diversaj movadoj de la esperantistoj, por la agado de la esperantistaj societoj.

Nenio povas esti pli erara. Esperantismo estas esprimo nur por tiu movado, kiu celas la progresigon de esperanto, kiel lingvon internacian, kaj laboras por ĝia disvastiĝo en la tuta mondo. Esperantismo estas nomo de lingva movado, kiu celas forigi la lingvajn barojn inter la diversaj gentoj de la mondo kaj doneniel povas esti identa je la aliaj movadoj de la esperantistoj. Estas tre, tre grave klarigi al ni tion. Esperanto estas nomo de internacia lingvo, kaj — ankoraŭ unu fojon — esperantismo nomo de movado, kiu celas la progresigon de esperanto kiel lingvo internacia. La »interna ideo« en esperanto, kiel lingvo internacia, ne ekzistas kaj neniam povas ekzisti! Tion ni memoru. La kreinto de esperanto povis havi »internan ideon« pri interfratiĝo, paco k. t. p., kiam li ellaboris la lingvon, multaj esperantistoj povas revii pri la samo, sed tio restas ilia privata opinio kaj ne estas ia apartenaĵo al esperanto. La esperantistoj povas revii pri kio ajn kaj labori pri konstruado de esperanto-urboj, domoj, mebloj k. t. p., ĉio tio ĉi eble povas esti esperantista, sed neniam esperanta movado. Ni ne senkreditigu la vorton »esperantismo« per iaĵ nebulaj revoj kaj fantaziaĵoj!

Sufiĉas, ke esperantismo estas nomo nur de simpla movado por internacia lingvo. Lingvo internacia estas ja en si mem problemoo treege grava, esperantismo do kultura movado de granda signifo por la tuta homaro.

Teodor Rosengren.

Ĉu ni devas porti la stelon?

»Multfoje subskribinto spertis, preparolante mian karan lingvon, ke la alparolitaj personoj diris: »Kial mi lernus esperanton? Ankoraŭ neniam aŭ preskaŭ neniam mi renkontis personon portantan same kiel vi tiun ĉi insignon, do mi opinias, ke ne ekzistas multaj esperantistoj.« Kaj vere estas tiel, la publiko ĉiam volas vidi ion kaj aŭdi pri esperanto; tage mi renkontas samideanojn ne portantajn la stelon, kaj kio estas la kaŭzo se oni demandas? La unua diras, mi tute forgesis, la dua, mi estas perdinta, la tria, mi neniam ankoraŭ posedis aŭ mi ne kuraĝas, la kvara eĉ hontas porti la verdan stelon, dirante, ke estas tro ordinare porti insignojn nuntempe k. t. p., k. t. p. Ĉu ne estas malĝoja afero?

Esperantistoj, ĉie kaj ĉiam portu nian stelon, por ke la publiko rimarku, kiel progresas nia afero, ĉar ĉu vi ne scias, ke ĉiu esperantisto devas esti propagandisto? Nun tiamaniere vi certe faros senvortan propagandon kaj multfoje la insigno estas la enkonduko de malgranda parolado k. t. p.

Th. J. v. Huessen en
»Holanda Pioniro«.



Bestaj amikecoj.

Tra la cenzuro feliĉe pasis la sekvanta simpla rakonto, sendita al ni de angla samideano: —

Estis iam hundo, kiu apartenis al sinjoro, kiu ankaŭ posedis maljunan katon. La lasta farigis tro malforta por kapti musojn; pro tio la hundo kaptis ilin kaj donis ilin al ĝi.

Ĉe iu farmo vivis koko, kiun la aliaj gekokoj ne ŝatis. Pro tio ili ne permesis al ĝi manĝi, sed konstante atakis ĝin. Hundo ankaŭ loĝis ĉe la farmo, kaj ĝi komencis stari apud la koko dum tiu manĝis sian manĝaĵon. Fine la koko komencis loĝi la tutan tempon en la hunddometo.

Kaj ĉe la sama farmo estis maljuna ĉevalo, kiu tre amis nigran katideton. Kiam ajn la ĉevalo estis

en la ĉevalo, la katido ankaŭ tie troviĝis. Dum horoj, ĝi dormis sur la dorso de l' ĉevalo, kiu tute ne moviĝis, por ke li ne veku la katiĉon. Aliajn fojojn, ĝi ludis sur ĝia dorso, kaj enmiksiĝis en la haroj de l' ĉevalo.

Do, eĉ la bestoj trovas, ke estas pli bone esti amikoj, sed la homoj...

— *Eric Biddle*
ĉe Birmingham, Anglujo.



La Esperos garanti- fond.

Tecknade andelar:

	Trpt. 365:—
Helmi Josefsson, Stockholm	10:—
K. A. Karlsten, Glommerstråk	5:—
E. Pausch, Gävle	10:—
Peter Berg, Kungslena	5:—

Summa Kr. 395:—

Gävle den 28 juli 1915.

Gävle Esperantoförening.



Bjelostok.

Stationen var ett sannt Babeis torn. Ryska, polska, lill-ryska, litaviska bondkvinnor, som tala det gamla för filologer så kära ariska språket, och den där lilla klungan av kvinnor bredvid dem — kan det vara tyska de tala? Nej, de äro judinnor och tala jiddish, en tysk-hbreisk dialekt, vars ljud påminner en om schweizertyskan i St. Gall. Vilken blandning av folkraiser i denna vrå av världen! Plötsligt kom det för mig, att Bjelostok var esperantos uppfinnares födelsestad! —

Edmond Privat i »The Daily News».



Bär Esperantostjärnan!

S. E. F.

Inbetalda årsavgifter:

1915.

Fabricius, Mimmi, Café Metropol,
Kiruna.

1914.

Gefle Esperantoförening för 102
medlemmar.

Kvitteras Gefle den 20/6 1915.

J. Helsing.

Kassör.



Alvoko al ĉiuj samideanoj. Grava propagando de esperanto.

Por diskonigi esperanton tra la tuta mondo, eĉ al la plej malgravaj lokoj, mi intencas eldoni grandan kolekton de esperantaj propagandaj markoj en ĉiuj lingvoj. Tiuj markoj enhavas la ĵenan frazon »Lernu lingvon internacian esperanton».

Sed por ke mi povu efektiviĝi mian entreprenon mi bezonas la helpon de aliaj samideanoj, kiuj bonvolu traduki la nomitan frazon al siaj respektivaj lingvoj (mi ĉefe bezonas la laplandan). Mi do per la nuna sciigo petas al ĉiuj samideanoj bonvolu sendi al mi kiel plej eble de tradukoj, sed ĉiam laŭ la nepra kondiĉo ke ili estu korektaj kaj kiel eble plej legeble, mi ankaŭ petas, ke se la sendotaj lingvoj posedas propran skribkarakteron, oni bonvolu ilin skribi en tiu karaktero. Mi devas averti, ke mi jam posedas la tradukojn el la plej parolataj eŭropaj lingvoj. Al ĉiu sendonto de iu tradukaĵo mi rekompence alsendos specimenojn de 40 belegaj esperantaj markoj el la 700 de mi eldonitaj.

Joan Amades,

Peu de la Creu nr-o, 10
Barcelona, (Hispanujo),



Nerefutebla pruvo.

La glora amerika verkisto Mark Twain estis rigardata kiel la unua spritkapablulo kaj talentulo de Usono. Oni atribuas al li multnombrajn spritajojn kaj sennombrajn mistifikajojn. Jen unu el ili, tute aŭtentike:



Gävle Esperantoförening

Ordinarie månadmöte avhålls tisdagen den 3 aug. kl. 8 e. m. å kafé D' Angleterre. Efter mötet samkväm.

Konversationskurs, eller, om vädret tillåter, utflykt i stadens omgivningar, äger rum varje söndag kl. 1/2 11 f. m. Samling vid kafé Esperanto. Obs! För alla medlemmar.

Föreningens **bibliotek** är flyttat till kafé Esperanto. Böcker utlånas genom bibliotekarien, herr Örn, eller kaféinnehavaren, herr Holmstedt, extra bibliotekarie.


Klerulo, fama aŭtoro, faris publikan paroladon antaŭ distinginda publiko. Mark Twain, laŭ sia bonhumora kutimo, intencis lin kritikaĉi. Li diris al li:

»Via parolado estis bonega, kara sinjoro, mi nur rimarkigas al vi, ke mi havas en mia biblioteko unu libron, en kiu ĉiu vorto de via bela parolado troviĝas, de la unua vorto ĝis la lasta.

La klerulo tre embarasiĝis kaj konfuziĝis, ja estas terure esti kulpigita pri plagiato! Li do postulis klarigon de Mark Twain, kiu promesis, ke morgaŭ li sendos tiun libron al la klerulo.

Kaj fakte, la morgaŭan tagon la eminenta oratoro ricevis de Mark Twain libron, zorge enpakitan. Malfermante la pakajon, li elprenis el ĝi — vortaron!

»Antaŭen Esperantistoj!«



Korespondado.

Germanujo-Bavarujo. — S-ro Ewald-Hugo Mühleisen, Stadthof, deziras korespondadi kun alilanduloj per poŝtkartoj ilustr., gazetoj esperantaj kaj naciaj, leteroj k. t. p. krom per poŝtmarkoj. Ĉiam certe respondos.

Anonceto pri korespondado kostas 40 oeroj (2 respondkuponoj).

HERRAR
EKIPERA SIG BÄST OCH
FULLSTÄNDIGAST HOS

Axel Lidholm
Drottninggatan 30 -- GEFLE

Josef Wikströms
Tobakshandel
GEVALIAPALATSET - GEFLE

SKODON

Största sortiment hos
A. M. Zimmerman & Co



La Espero

utgives av Gefle Esperantoförening och utkommer omkr. den 15 i varje månad. Lösnummerpris 10 öre. Prenumerationspris Kr. 1: 20.

Prenumeration kan ske dels direkt hos tidningens expedition, Gefle, dels genom återförsäljare eller på posten.

Återförsäljare önskas på varje plats! Provision om flere exemplar tagas!

Prenumerantsamlare erhålla 20 öre för varje anskaffad prenumerant, om minst 5 prenumerationsavgifter insändas samtidigt.

Esperantopapeterkartong, 25 ark brevpapper + 25 kuvert, damf. 1: 50

" d:o, d:o, herrformat 1: 65

Esperantocopiepennor, 30 öre st., 3: -- kr. dussin (hårda eller lösa).

Esperantoblyertspennor, 10 öre st., 1: -- kr. duss. (hårda eller lösa).

Allt franco.

Beställes hos **W. Wahlund, Gefle.**

Kiam vi bezonas
viandon, mendu
ĉe

FRANS A. OLSON
Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

Central- och Jernvägshotellen

GEFLE

REKOMMENDERAS!

C. J. LINDH

BOK- & DISTRIBUTIONSAFFÄR
S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE

Rekommenderar sig vid behov av Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.
RIKSTELEFON 16 97.

Prenumerera på NORRKÖPINGS
UNGDOMS-REPUBLICS tidning

ÖRNEN!

Kr. 1: 50 pr år. Minst 12 nummer
"ärligen.
Begär provnummer, som sändes mot
10 öre.

LEANDER TELL, Norrköping.

Wickmans Kappaffär

NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE
Vid Rådhusplanaden.

Kappor o. Promenaddräkter i stort urval.
Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.

RIKSTELEFON 1391.

Gust. Holms Förstoringsanstalt

Brunnsgatan 78, Gefle. •• Rikstel. 16 28.

Faras pligrandigojn laŭ fotografajoj.
Unuaklasa laboro. Petu prezaron!



N. Lundgren

GEFLE - Interurba tel. 151

Kamentuboj por fabrikoj.

Pli ol 800 konstruitaj.
Riparoj dum uzado.
Fulmkonduktiloj estas muntataj.
Propra brikejo en Upsala.
Plej granda firmo por konstruo de
fabrikaj kamentuboj en Skandinavio.

Argenta medalo en Stockholm 1897

" " " Gefle 1901

" " " Norrköping 1906

Prenumerera på »La Espero»!

"LA ESPERO"

Gamla årgångar av La Espero (år 1913 och 1914) finnas i ett begränsat antal och säljas till ett pris av 1 kr. pr st. Varje esperantoförening ävensom varje intresserad esperantist bör äga dessa.

Lösa nummer av tidningen kunna för spridning i propagandasyfte erhållas gratis av intresserade.

Tillskriv *La Esperos expedition, Gävle.*

Glöm ej!

Café "Esperanto"

under sommarmånaderna.

ESPERANTISTER!

Köp och drick den verkligt goda njutnings- och sällskapsdrycken

ESPERANTO PUNÇO

Alkoholfri.

REKV. FRÅN ANTON ÖSTLING,
Styrmansgatan 36, NORRKÖPING.

Carl Larssons

FOTOGRAFIATELIER

NYGATAN 34

Rekommenderas!

TELEFON 357

Från **"La Esperos" Expedition, Gefle,**

kan rekvideras:

Läroböcker:

Lärobok i Esperanto av

G. H. Backman 1: -- + porto 0. 10

Lärobok i Esperanto av

P. Nylén 1: -- + » 0: 12

Lärobok i Esperanto av

Carl Ohlsson 0: 50 + » 0: 08

(Alla med Esp.-svensk ordlista)

Esperantospråklära av

O. W. Hjartstätt ... 0: 40 + porto 0: 08

Esp.-svensk o. Svensk-

esp. ordbok av Hjart-

stätt 0: 60 + » 0: 08

Svensk-esp. ordbok av

E. L-son Finn 1: 50 + » 0: 12

Unua Legolibro av Dr.

Kabe 1: 60 + » 0: 12

Nova Testamento (mjukt

band 2: 50 + » 0. 30

Sveda Kantaro, kun me-

lodioj 0: 35 + » 0: 08

Esperantista Kantaro... 0: 75 + » 0: 04

Esperantosjäljnor 0: 75 + » 0: 10

Esperantobordsflaggor 2: 40 + » 0: 30

D:o (nägot enklare) 1: 75 + » 0: 30

D:o (grindre)..... 0: 85 + » 0: 30

Esperantoflagga 0: 50 + » 0: 08

D:o (miniatyr) 0: 15 + » 0: 04

E. Liljemarks

Cigarr- och Tobakshandel

S. Centralgatan 28 och S. Kungsgatan 28

rekommenderas!

Prima varor till billigaste priser.